NIA PONTO

Grupo Esperantista	E-kursoj: Vendrede
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre	Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
E-48005-BILBAO (Hispanio)	Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
☎: 94.416.44.92	Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato
💻: tepgaitj@lg.ehu.es aŭ esperantobilbo@lettera.net	
Jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj	**BBK-konto: 22-1800155-0**

SEPTEMBRO/OKTOBRO 1.999



La 3 bilbaoanoj (Teodoro Ibáñez, David Redondo kaj Jesús M. García), kiuj partoprenis la Hispanan Kongreson de Castellón; ili pozas tuj post la inaŭguro de la placo "Esperanto".

NEKROLOGO.

La pasintan 12-an de Julio mortis, en Bilbao, **M. Carmen Norabuena**, edzino de nia kara kaj veterana amiko Eduardo Larrouy. Ambaŭ kune partoprenis diversajn hispanajn kaj universalajn kongresojn ĝis kiam malsanoj tion ne permesis. Ke ŝi pace ripozu.

MONTO-EKSKURSOJ.

Kiel jam anoncite en la antaŭa cirkulero, ni rememorigas vin pri tio, ke la **dimanĉon 26-an de Septembro** ni iros al monto Oketa (Alava); eliro okazos je la **9-a h.**, el **Teatro Arriaga**.

La sekvonta ekskurso estos al monto Erlo (Gipuzkoa), la **17-an de Oktobro**, kaj ankaŭ ni eliros je la **9-a**, el **Arriaga**.

PETO DE SUBVENCIO.

Nia amiko David Mediavilla, nuntempe laboranta en Mondragón profitis la eblecon peti subvencion al sia propra entrepreno por liveri E-librojn al bibliotekoj de la urbetoj de la tiel nomata regiono "Alto Deba". Lernolibroj, gramatikoj, romanoj, ... staros sur la bretoj de tiuj bibliotekoj se la afero sukcesas.

ELIRO AL "NOVA PLACO".

Jam pretaj komencigi novajn kursojn, ni petas vian helpon por propagandi ilin: krom sendo de leteroj al ĉiuj amaskomunikiloj de Bilbao kaj gluado de afiŝoj, ni starigos informan tablon ĉe la "Nova Placo" ("Plaza Nueva") de Bilbao, **ĉiun dimanĉon**, ekde la 19-a de Septembro ĝis kiam la kursoj komenciĝos (13-an de Oktobro). Se vi deziras helpi, ni rendevuos **je la 10-a ĉe nia Grupejo**, antaŭ ol kune marŝi al la placo.

PAGO DE CUOTAS.

Si a la izquierda de estas líneas aparece dibujada una "X", significa que aun no has hecho el pago de tu cuota de soci@ correspondiente al presente año de 1.999. Te recordamos que es de tan sólo 15 euros (2.500 pts) y que puedes hacerla efectiva en la cuenta de la BBK que figura en el encabezamiento de esta circular.

NOVA ASOCIO.

Tiel kiel oni informis dum la lasta ĝenerala kunveno, diversaj homoj, kelkaj el ili ligitaj al E-Grupo de Bilbao, starigis novan asocion, kies nomo estas "Asociación Lingüística Nazioarteko Hizkuntzaren Lagunak - Amigos de la Lengua Internacional ("NAHIZ")"

Ĝiaj celoj estas, interalie, trastudi la diversajn projektojn pri "naturaj" aŭ "artefaritaj" lingvoj, kies celo estas fariĝi internaciaj, antaŭenpuŝi ĉiujn agadojn celantajn tiun idealon surbaze de neŭtraleco kaj egaleco.

La estraro de tiu nova asocio konsistas el: Prezidanto: Sabin Orueta Mendia; Sekretario: Jesús M. García Iturrioz; kasisto: José L. Bringas Tellechea.

Ĝia provizora sidejo estas la loĝadreso de la Prezidanto kaj, kompreneble, estas asocio malfermita al ĉiuj homoj interesataj pri la starigo de unu lingvo internacia.

PASINTAJ SOMERAJ KONGRESOJ.

De la 17-a ĝis la 21-a de Julio okaziĝis en Castellón la Hispana Kongreso. Ĝin partoprenis 3 membroj de nia Grupo plus alia kiu vizitis ĝin dum kelkaj horoj. Rimarkinda estas la multnombra partopreno de eksterlandanoj, kio aspektigis la kongreson pli internacia ol neniam antaŭe kaj devigis la partoprenantojn paroli nur Esperante.

De la 31-a de Julio ĝis la 6-a de Aŭgusto okaziĝis la Universala Kongreso en Berlino. Tien iris 4 membroj de nia Grupo. Entute partoprenis iom pli ol 2.700 homoj. Altnivelaj estis la kursoj de la Internacia Kongresa Universitato, kies Rektoro, Reinhard Selten, Nobel-premiito en la jaro 1994 pri ekonomiko, prezentis kelkajn prelegojn.

Unu bilbaoano vojaĝis al Berlino ene de bus-karavano organizita de la valenciaj samideanoj. Entute, 19 hispanoj aliĝis al tio. Post Berlino, ili iris al Bydgoszcz (Polio), kie okazis kunveno de Monda Turismo; kaj revene al Hispanio, estis 1-taga restado en Prago por spekti la sun-eklipson. La etoso estis vere amikeca kaj larmoj ekaperis ĉe disiĝo.

Alie, UEA jam decidis kie okazigos la venontajn kongresojn: Tel-Aviv (Israelio) 2000; Zagreb (Kroatio) 2001; Fortaleza (Brazilio) 2002.

VENONTAJ ARANĜOJ.

Kelkaj el ni ĵus revenis el someraj kongresoj kaj kunvenoj, kiam jam estas anoncataj la datoj de aliaj, kiuj okazos en la jaro 2.000:

27 Apr./01 Maj. 4-a Eŭrop-Unia E-Kongreso. Oostende (Belgio).
25 Jun./01 Jul. Renkontiĝo de Naturprotektantoj "Sukcena Vojo". Estonio - Latvio. Ege interesa ekologia programo.
30 Jun./05 Jul. Saint-Chamond (Francio). Solidaraj Tagoj.
05-09 Jul. Tuluzo (Francio). Kultura Arta Festivalo de Esperanto (KAFE). Eblas helpi la organizantojn, ĉar oni deziras ke estu multlanda organizaĵo. Informojn ĉe la Grupejo.
04-08 Jul. Valencio. 2-a Apudmara Kultura E-Semajno.
3-a semajno Jul. Moskvo. Kongreso de SAT.
25 Jul. / 01 Aŭg. Tel-Aviv (Israelio). Universala Kongreso de UEA.
05/12 Aŭg. 56-a Internacia Junulara Kongreso. Honkongo.
13/19 Aŭg. 7-a Kultura E-Festivalo. Helsinko.

Kiel ĉiam, informojn kaj kunvojaĝant(in)ojn vi trovos en nia sidejo.

LA MALJUNEGA LEONO KAJ LA VULPO.

Maljuniĝis la leono. Li jam ne povis perforte havigi nutraĵon. Li tion pensis, ke per helpo de sia cerbo akiros manĝaĵon. Li enŝoviĝis en kavernon, kuŝiĝis, kvazaŭ estus malsana. Li ordonis la bestojn antaŭ sin, poste laŭvice ekprenis ilin kaj manĝegis ĉiujn.

Li jam multon mortigis, kiam venis la vulpo. La vulpo antaŭflaris la ruzaĵon, tial li staris pli malproksime de la groto. De tie demandis li la leonon, kiel li fartas?.

- Malbone - respondis tiu. Sed kial vi ne venas pli proksimen?.
-Mi irus - respondis la vulpo, se mi ne vidus, kiom da piedsignoj iras internen, sed neniom eksteren.

Fabelo de Ezopo.Trad. Ilona Fédor (Hungario).